

## 9

# *Stranga Gastejo*

**S**an Francisco situas sur la plej eksterna pinto de duoninsulo, havas la grandan oceanon en la okzideton, la belegan golfeton en la oriento, kaj la eniron de tiu golfeto en la nordo. La haveno de San Francisco estas eble la plej bela kaj plej sekura de la tuta mondo, kaj samtempe havas dimension, kiu permesus kunvenigi la ŝiparojn de ĉiuj landoj. Ĉi tie oni ĉie vidas la viglan moviĝon, nepriskribeblan ĥaoson de plej multispeca enloĝantaro, kiu imageblas. La eŭropanojn el ĉiuj landoj akompanas la ‚sovaĝaj‘ aŭ duoncivilizitaj rŭghaŭtuloj, kiuj surmarkedigas ilian ĉasakiron kaj boneble ricevas la unuan fojon de ilia vivoj por ĝi prezon, kiu povas esti nomata trompa. Jen la fiera, pitorekse vestita meksikano promenas flanke de la simpla ŝvabo; la indiferenta anglo flanke de la moviĝema franco; la hinda kulio en blanka lanvesto renkontas la malpuran polan judon; la eleganta afektulo la krudan provincanon; la komercanta tirolano la orserĉiston, kies haŭto estas bruniĝinta, kies haroj estas nekombitaj, kaj sub kies taŭza barbo malaperas ĉio, kion oni kutime priskribas per la vorto ‚vizaĝo‘. Jen troveblas la mongolo el la altaj ebenaĵoj de Azio, la persoj el Hindujo, la malajziano de la Sunda-insuloj, kaj la ĥino de la bordo de la Jangzio.

Tiuj ‚filoj de la meza regno‘ estas la plej granda parto de la fremdlandaj enloĝantaro, kaj donas specialan nuancon al ĝi. Ili ĉiuj ŝajnas faritaj el la sama ŝtofo kaj per la samaj iloj. Ĉe ĉiuj la nazo estas mallonga kaj reversumita; ĉe ĉiuj la supra makzelo pli elstaras ol la malsupra; ĉiuj havas la eĝe eliĝantajn vangostojn, la klinite fendajn okulojn, la saman hautkoloron, brune verdo sen iaj nuancoj, pli helan frunton; ĉie oni vidas la esprimon en la nemoviĝaj, sensignifaj trajtoj la esprimon, kiun oni povus priskribi per la vorto ‚nenionsenta‘, kaj tial ankaŭ eĉ ne estus esprimo, se ne io videblas en la kunpinĉitaj okuloj, kiu karakterizas ilin ĉiujn: la insidemo.

La ĥinoj estas la plej diligentaj laboristoj de San Francisco. Tiuj malgrandaj, rondaj, bonnutritaj kaj tamen tiel movemaj uloj havas maloftan talenton pro ajn elpensebla

farado de ĉiaj laboroj, pro kiu gravas lerteco de la manoj kaj pacienco. Ili skulptas eburon kaj lignon, tornas metalon, brodas en tukojn, ledon, lanon, tolon kaj silkon. Ili trikas kaj teksas, desegnas kaj pentras, puntplektas kaj kudras. Ili kunplektas eĉ la plej malfleksiblajn aĵojn kaj faras strangajn, admirindajn aĵojn, kiuj certigas al ili la klientaron de ĉiuj kolektistoj de raraĵoj.

Kromas, ke ili estas modestaj kaj kontentiĝas pri la plej eta profito. Ili ja postulas impertinente, sed oni scias, ke ili permesos negocion kaj akceptos, kiam oni ofertas trionon aŭ eĉ nur kvaronon de ilia postulo. Ankaŭ la tagsalajro, kiun oni pagas al ili, estas pli malalta ol tiu, kiun oni donas al blankulo. Sed ĝi ja estas ankoraŭ dekoble pli alte ol en ilia hejmlando, kaj ĉar ili elspezas malmulton, ĉar ili vivas eminentege modeste kaj ŝpareme, ili kontentas. Ĉiuj malgrandaj metioj estas iliaj, kaj ankaŭ la vestpurigado kaj ankaŭ la mastrumado de domoj kaj kuirejoj estas farata de ili.

Sed ne nur la ĥinoj viglas, sed bonega estas ĝenerale la faremo de ĉiuj enloĝantoj de tiu urbo. La homoj ĉiuj havas nur unu celon: ili volas gajni monon, fakte laŭeble multe kaj rapide. Ĉiuj scias, ke tempo estas mono, kaj ke ĉiu, kiu atendigas alian, malhelpas al si mem, kaj tial ĉio okazas sen halto.

Tiel ĝi estas en la domoj kaj sur la kortoj, tiel ĝi estas ankaŭ sur la stratoj kaj placoj de la urbo. La pala, maldika anglino, la fiera, nigrokula usonanino, la blonda germanino, la gracia francino, la negraj ,damoj' ĉiuj, ili iras, ŝvebumas, hastas paŝete jen kaj reen. La riĉa bankisto kun frako, gantoj kaj cilindra ĉapelo havas ŝinkon en unu, kaj leguman korbon en la alia mano. La *ranchero* svingas reton kun fiŝoj trans la ŝultro, pro festi la solentagon kun tio. Milica oficiro tenas grasigitan kaponon per la mano. Kvakero havas kelkajn grandegajn omarojn en la kiel antaŭtuko suprenigata branĉidoj de lia longa jako — kaj tio ĉio moviĝas ĥaose flanke, antaŭe, malantaŭe de la alia senĝene.

Je nia alveno al la ĉefurbo de la orlando ni senhaltigite kaj senĝenite atingis tra la ĥaosado kaj la svarmado la Sutterstreet:on, kie ni baldaŭ trovis la hotelon Valladolid. Estis gastejo en la kalifornia stilo, longa, unuetaĝa latkonstruaĵo, simile al la unutagaj drinkejoj, kiujn oni starigas je niaj *schützengfest*:oj.

Ni lasis niajn ĉevalojn al la *horsekeeper*, kiu kondukis ilin en etan dometon. Ni mem sed paŝis en la gastan ĉambron, kiu malgraŭ ĝia eminenta grandeco estis tiel malplene, ke ni preskaŭ ne povis konkeri tablon por ni. Kelnero alvenis. Ni mendis ĉiu laŭ sia ŝato, kaj kiam la postulitaĵoj estis alportinta, ni ankaŭ komencis nian demandadon:

„Ĉu *señor* Enrique Gonzalez estas interparolebla?“

„Yes, Sir. Ĉu Vi deziras, ke mi venigu lin?“

„Jes, se mi rajtas peti!“

Alta, seriozanima hispano venis al ni kaj prezentiĝis kiel *señor* Gonzalez.

„Ĉu Vi povas diri, ĉu unu Allan Marshal ankoraŭ loĝas ĉe Vi?“

„Mi ne scias, *señor*, mi ne konas lin, konas nenium, mi ĝenerale ne zorgas pri la nomoj de miaj gastoj. Tio estas la tasko de la *señora*.“

„Ĉu ni povas paroli kun ŝi?“

„Mi same ne scias. Demandu unu el la knabinoj.“

Post tio li deturniĝis. Ŝajne li estis en la sama rilato kiel la *ranchero* Fernando de

Venango al *señora* Eulalia, ŝia fratino. Mi do stariĝis kaj iris al la ĉiela direkto, el kiu vastiĝis invitanta rostaĵaodoro. Dum tio mi trovis malgrandan, maldikan personinon, kiuj haste volis pasi preter mi. Mi ekprenis ŝian brakon kaj tenis ŝin.

„Kie estas la *señora*, mia etulino?“

Ŝiaj malhelaj okuloj brilis kolere al mi.

„*Vous êtes un âne!*“

Ha, do francino! Senvole ŝi deŝiriĝis kaj forhastis. Mi pluiris. Je la eĝo de tablo mi trovis duan helpistinon.

„*Mademoiselle*, ĉu Vi havas la bonvolon diri al mi, ĉu mi povas paroli kun la *señora*?“

„*I am not mademoiselle!*“

Kaj jam ŝi foris. Do anglino aŭ usonanino! Se mi devis traprovi ĉiujn popolojn kaj lingvojn laŭ la vico ĝis mi atingis mian *señora*:n, mi estus ne sukcesinta tion ĝis la vespero. Sed tie transe staris virino, kiu sekvis min per la okuloj, kaj — fakte, tiun vizaĝon mi ja iam jam vidis! Denove mi altigis la velojn kaj direktiĝis rekte al ŝi. Sed mi ne jam estis atinginta ŝin, kiam ŝi kunbatis la manojn kaj saltis al mi, kvazaŭ ŝi havus la intencon terenigi min.

„Sinjoro najbaro, ĉu eblas? Mi preskaŭ ne estus rekoninta Vin, tian barbon Vi lasis kreski!“

„Pro la kukolo! Gustel! La Gustel de la Eberbach:oj! Preskaŭ mi ankaŭ ne estus rekontinta Vin, tiel Vi grandiĝis! Sed kiel Vi venis de hejme transe al Ameriko, al Kalifornio?“

„La patrino ekmortis, mallonge post Vi reeniris rigardi la mondon! Venis peristo, kaj la patro lasis persvadi sin. Okaziĝis alimaniere, kiel li pensis. Li nun estas kun la fratoj tie, kie laŭdire ĉirkaŭkuŝas tiom da oro, kaj lasis min tie ĉi, kie mi fartas bone kaj atendos, ĝis miaj familianoj revenos.“

„Ni interparolos plu“, mi diris. „Sed nun diru al mi, kie la *señora* troveblas! Mi demandis du el Viaj samprofesulinoj pri ŝi, sed nur ricevis krudaĵojn kiel respondo.“

„Tio facile klarigeblas, ĉar la *madame* estu nomata nur *doña*, plej favore nur Doña Elvira.“

„Mi memortenos tion! Do, ĉu ŝi kunparoleblas?“

„Mi vidos. Kie Vi sidas?“

„Tie je la dua tablo.“

„Intertempe reeniru tien. Mi sciigos Vin, sinjoro najbaro!“

Tiu denove estis unu el tiuj miraklaj renkontiĝoj, kiajn mi havas tiel ofte. La patro de Gustel Eberbach kaj la mia estis najbaroj, kaj ambaŭ baptopatriĝis por la alia. Nun la maljuna lignaĵisto estis malsupre en la orminaro. Liaj du filoj, el kiuj la pli maljuna estis estinta mia samklasano, troviĝis ĉe li, kaj tuj en la unua gastejo, en kiun mi iris tie ĉi en San Francisco, mi renkontis lian plej maljunan filinon, la Gustel:on, kiu, kiam mi portis ŝin sur la brako, ĉiam taŭzigis mian densajn harojn, ke ili ĥaose stariĝis supren. Tiam ŝi ridis kaj frotis sian malgrandan nazeton sur la vizaĝo. Tiutempe mi ne estus pensinta, ke ni revidiĝus en Kalifornio. Jam post mallonga tempo ŝi venis al mi.

„La *señora* volas vidi Vin, kvankam fakte nun ne estas ŝia akcepta horo.“

„Ĉu akcepta horo? Ĉu gastejstrino?“

Gustel tiris la ŝultrojn supren.

„Ŝi do havas ĝin, fakte dufoje po tago: matene de la dek unua ĝis la dek dua kaj posttagmeze de la sesa al la sepa horo. Ajn kiu venas ekster tiu tempo, atendu, se li ne estas bone referenciita.“

„Ha, multan dankon!“ mi ridis. „Oni ja tute ne kredas, kiom valoras amikeca najbarino!“

„Ĉu ne? Nu, venu!“

La afekto tute havis la aspekton, kvazaŭ mi estu akceptata de eminenta gravulo. Mi estis kondukata en malgrandan ĉambron, kiu estis ekipita kiel antaŭĉambro. Per la postulo de Gustel mi devis atendi tie tiel longe, ĝis eksonis sonorilo malantaŭ la kurteno.

Tio estis sufiĉe strange, krome ĉar mi devis atendi preskaŭ duonan horon, ĝis la signo estis farata. Mi eniris kaj troviĝis en ĉambro, kiu estis laŭvorte troplenigita per kolekto de ĉiaspecaj meblaĵoj kaj ekipaĵoj. Doña Elvira certe nepre devis havi abunde ekipitan ĉambron, kaj ŝi ankaŭ ekipis ĝin tiel, ke oni ne povis vidi unu centimetron de la muro. Ŝi sidis sur sofo, apogiĝante per la mano sur mapon, kiu pendis malsupren trans la flanko apogilo. Sur ŝiaj kruroj estis gitaro, flanke de ŝi komencita brodaĵo, kaj antaŭ ŝi estis pentrostablo, sed tiel inter ŝi kaj la fenestro, ke la ĉambro malhelis. Sur la surfiksita blanka papero mi rimarkis du duonpretajn skizojn. Se mi ne eraris, unu el ili estu la kapo de virkato aŭ de maljuna virino, al kiu ankoraŭ mankis la matena kufo, kaj la alia estis certe io botanikeca, sed mi ne certe povis decidi, kia aĵo ĝi estu. Aŭ tiu desegnaĵo reprezentu kaĉaloton je centobla maldikigo aŭ tenion je samrilata dikigo.

Mi kliniĝis profunde kaj devote. La *señora* ŝajne ne rimarkis tion, sed tenis sian okulon direktigite al punkto de la plafono, je kiu mi ne povis vidi ion interesigan. Sed subite ŝi turnigis la kapon per rapida eko kaj demandis min en la angla lingvo:

„Kiun distancon havas la luno de la tero?“

Tiu demando ne surprizis min. Mi estis ekspektinta tian strangajon. Sed — se Vi venas tiel, Vi estu ricevata tiel!

„Kvindek kvar mil mejlojn, fakte lunde“, mi respondis. „Sabate en la proksimo de la tero nur ĉirkaŭ kvindek mil.“

„Prave!“

Ŝi denove fiksrigardis la menciitan punkton. Tiam okazis la sama subita ekturto al mi, kaj ŝi demandis:

„El kio oni faras marcipanon?“

„El sukero, amandoj kaj rozakvo.“

„Tre prave!“

La bedaŭrinda punkto devis lasi sin uzi trian fojon, tiam ŝi ĵetegis al mi la demandon:

„Kio estas *poil de chèvre*?“

„Vestaja ŝtofo, kvindek ulnojn pro la *escudo* de oro, sed estas nun ne plu ofte surmetata.“

„Prave! Kaj nun estu benvenataj, *señor!* Augusta petis pri mia favoro pri Vi. Sed mi ne tree malŝparemas pri ĝi, kaj kutimas ekzameni ĉiun, kiu aspiras pri ĝi. Vi germanoj estas konata per Via lernemo, tial mi elektis la plej malfacilajn demandojn el la diversaj fakoj de la homa scio, kaj Vi pruviĝis bonege, kvankam Vi plie havas la aspekton de urso, ne de bonedukitulo. Sed Augusta diris al mi, ke Vi estis en multaj lernejoj kaj vizitis ĉiujn landojn kaj popolojn. Sidiĝu, *señor!*“

„Dankon, Doña Elvira de Gonzalez“, mi respondis, modeste sidiĝante sur eĝon de seĝo.

„Ĉu Vi deziras loĝi en mia domo?“

„Jes.“

„Vi rajtas, ĉar Vi estas tre ĝentila viro, kiel mi vidas, kaj ankaŭ Via ekstero estos pli dece, kiam Vi klopodos. Ĉu Vi estis en Hispanujo?“

„Jes.“

„Kion Vi diras pri la mapo, kiun mi koncipis de mia hejmlando?“

Ŝi donis la folion al mi. La mapo estis laŭdesegnita trans maldika papero, kaj eĉ laŭ malbona laboraĵo.

„Tre ekzakte, Doña Elvira de Gonzalez!“

La stranga sinjorino akceptis mian laŭdon kiel ion memkompreneblan.

„Jes, ni virinoj finfine certigis pri ni mem, kaj nia plej grava venko estas, eniĝi en la profundaĵojn de la scienco, kaj ankaŭ estiĝi bona ekzemplo al la viroj en la belaj artoj. Vidu al tiuj du pentraĵoj. Ili estas nekompareblaj per la eminenteco de la riproĉo. Tiu fajneco de la lineoj, tiu ombrumaĵo, tiu reflektumo de la lumo! Vi estas konulo, tamen mi ekzameni Vin. Kion reprezentas tiu?“

Certe mi estus suferinta malhonorigan malvenkon, se la „ eminenteco de la riproĉo “ ne estus doninta klarvideblan indikilon al mi. Tial mi respondis per egalanima aŭdeco:

„Marserpenton.“

„Prave! Ja neniu estis vidinta ĝin klare, sed kiam la sciencisto mezuras spacojn, en kiu li neniam povos eniri, estas ankaŭ la tasko de artisto kompreni aĵojn, kiujn li ne jam povis vidi. Kaj tiu desegnaĵo, ĉu?“

„Estas la gorilo de la fama Du Chailly.“

„Prave! Vi estas la plej dokta viro, kiun mi iam estis havinta antaŭ mi, ĉar neniu antaŭ Vi tuj rekonis la marserpenton kaj la gorilon. Vi maturas pro ĉia akademia digno!“

Tiu agnosko, kiu devis plenigi min per fiero, preskaŭ havis la saman efikon kiel la ajlo kaj la cepoj de la bona *señora* Eulalia. Ties mensabunda fratino nun montris al la tablo, kiu estis ĉe la eniro.

„Mi regas mian domon, sen kontaktiĝi kun la ordinaraj aĵoj de la mastrumado. Tie estas inko, plumo kaj libro. Enskribu Vian nomon!“

Tion mi faris, kaj poste demandis:

„Ĉu mi eble rajtas ankaŭ enskribi la nomojn de miaj kunuloj?“

„Vi havas kunulojn, ĉu? Kiuj ili estas?“

Mi komencis per la negro.

„Cäsar, mia nigra servisto.“

„Memkompreneble, ĉar viro, kiu rekonas mian marserpenton je la unua vido, povas vojaĝi nur kun servistoj. Sed iliajn nomojn oni ne enskribas. Plu!“

„Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj.“

Ŝi faris moviĝon de surpriziĝo.

„La fama Winnetou, ĉu?“

„Certe.“

„Tiun mi vidu. Vi konatiĝu min al li! Enskribu lian nomon!“

„Krome unu Sans-ear, kiu —“

„La indianmortigisto, ĉu?“

„Jes.“

„Enskribu lian nomon! Vi ja vojaĝas en vere elektita societo. — Plu!“

„La kvara kaj lasta estas *Mr.* Bernard Marshal, juvelisto el Louisville, Kentucky.“

Nun ŝi preskaŭ estus stariĝe saltinta de sia sidejo.

„Kion Vi diras! Juvelisto el Louisville!“

„Bernard havas fraton, nomata Allan“, mi kompletigis, „kiu havis la feliĉon esti permesata loĝi ĉe Vi, Doña Elvira de Gonzalez.“

„Do mi supozis ĝuste! Tuj enskribu ankaŭ lin, *señor!* Vi havu la plej bonan dormejon. Sed fakte ne estas ĉambroj en la hotelo Valladoid, sed Vi tamen kontentu pri mia domo, kaj ĉi vespere Vi ĉiuj estas invitataj al mia tablo en mia privata manĝoĉambro.“

„Dankon, Doña Elvira. Mi donos la certigon al Vi, ke mi povas apreci tian honorigon tre ĝuste. Mi kutime transdonas la spertojn, kiujn mi kolektas dum miaj vojaĝoj printe al la publiko, kaj ne neglektos ege rekomendi la hotelon Valladoid.“

„Faru tion, *señor*, kvankam mi ne povas facile imagi Vian personon sidante ĉe skribotablo! Ĉu Vi eble havas peton? Mi ŝate volus plenigi ĝin!“

„Ne peton, sed demandon mi volus permesi al mi.“

„Ĉu demandon?“

„Jes. Ĉu Allan Marshal ankoraŭ loĝas ĉe Vi?“

„Ne. Li forlasis mian domon antaŭ preskaŭ kvar monatoj.“

„Kien li iris?“

„Al la *diggins*:oj ĉe la Sacramento.“

„Ĉu Vi ricevis mesaĝon de li?“

„Jes, unu fojon. Li konigis al mi la lokon, al kiu mi eventuale plusendu leterojn al li.“

„Ĉu Vi povas memori la adreson?“

„Tre bone, ĉar la pereanto, al kiu la leteroj estu sendataj, estas vizitinto de mia domo. *Mr.* Holfey, Yellow Water Ground, komercisto, ĉe kiu la orserĉistoj povas aĉeti ĉion.“

„Ĉu ekde lia foriro de tie ĉi alvenis leteroj al Allan?“

„Kelkaj, kiujn mi ĉiam plusendis je la neksta ebleco. Kaj krome — jes, antaŭ ne longe ĉi tieis du viroj, kiuj demandis pri li — komercaj amikoj, kiuj necese devis intertrakti kun li; mi ankaŭ donis lian adreson al ili.“

„Ekde kiam tiuj du viroj forestas?“

„Atendu, jes — ili forrajdis hieraŭ frue.“

„Ĉu pli juna kaj pli maljuna?“

„Prave. Ili ŝajnis esti patro kaj filo. Ili estis referenciitaj de mia fratino, ĉe kiu ili estis ĝuinta gastakceptecon.“

Mi kapjesis.

„Vi parolas pri la *rancho* de don Fernando de Ventago y Colonna de Molynares de Gajalpa y Rostredo, ĉu?“

„Kio, ĉu Vi konas tiun viron?“

„Tre bone, kaj same Vian fratinnon Doña Eulalia:n, ĉe kiu ni estis, senke mi petis ŝin kundoni leteron kiel referenciaĵo.“

„Ĉu tio eblas? Rakontu, *señor*, rakontu!“

Laŭdezire mi raportadis al ŝi, dum kio mi memkompreneble ne estis treege malkaŝeme. Ŝi aŭskultis min per vigla atento, kaj diris, kiam mi finiĝis:

„Mi dankas al Vi, *señor*! Vi estas la unua germano, kiu komprenas internegoci kun hispana *señora* en la deca maniero. Mi antaŭĝojas pri la hodiaŭa verspermanĝo kaj sciigos Vin ĝustatempe. *Hasta luego!*“

Per dignoplena kliniĝo, kiu certe ege kontrastis al mia ekstero, mi elmoviĝis reen. Kiam mi iris en la gastejon, la vidoj de la gekelneroj direktiĝis al mi per rimarkebla atento. Gustel Eberbach tuj alvenis.

„Sinjoro najbaro, kia feliĉulo Vi estas! Tiel longe neniu antaŭe estis aŭdiencite de la *señora*, eĉ ne duone tiel longe. Vi certe ege plaĉis al ŝi!“

„Male!“ mi respondis ridante. „Ŝi volas teni min tie ĉi nur per la kondiĉo, ke mi pli-boniĝas. Ŝi diris, ke mi vere aspektus kiel urso.“

„Hm, ŝi tute ne malpravas pri tio. Sed mi povas helpi je tio. Mi kondukos Vin supren en mian ĉambron kaj alportos ĉion, kion Vi bezonas: razilaron, akvon, sapon, ĉion!“

„Tio ne necesas, ĉar ni estos baldaŭ kondukataj en nian dormejon“, mi diris.

„Ne kredu tion! La ordonojn pri la partigo de la dormejoj mi rajtas ekscii nur ekzakte je la oka, neniun minuton pli frue.“

„Ni ricevu la plej bonajn domejojn, la *señora* diris. Kie ili estas?“

„La dormejoj ĉiuj estas supre, sub la tegmento. Vi do ricevos la apartigataĵon, kiu plejboniĝas per la plej bona aero.“

En tiu momento eksonis la laŭta sono de sonorilo.

„Estas ŝi, sinjoro najbaro. Mi hastu, ĉar se ŝi alvokas je nekutima tempo, certe io grava okaziĝis.“

Gustel forkuris, kaj mi sidiĝis ĉe la kunuloj, al kiuj koncentriĝis la vidoj de la gastoj, kvankam tie ĉi en San Francisco la apero de okcidentulo aŭ indiano estas io ĉiutaga. Speciale estis la majesta impresigo de Winnetou, kiu kaŭzis atenton, kaj ke al Mark, la malgrandulo, mankis la oreloj, konvinkigis ĉiun, ke li estis spertinta ion tre nenormalan.

„Ĉu nu?“ Bernard demandis.

„Via frato foriris antaŭ tri monatoj kaj sendis mesaĝon nur unu fojon de la Yellow Water Ground. Viaj leteroj estis plusenditaj al li tien.“

„Kie estas tiu loko?“

„Estas, laŭ mia memorpovo, flanka valo de la Sacramento, kie oni trovas multan

oron. Laŭvorte tie estis amasoj da *digger*-oj, sed nun ili ŝajnas esti foririnta plu laŭ la rivero kontraŭflue.“

„Ĉu Allan lasis ion tie ĉi?“

„Fakte mi ne demandis Doña Elvira:n pri tio.“

„Sed Vi demandu!“

„Baldaŭ estos la ŝanco pro tio. Ni ĉiuj estas invititaj vespermanĝi.“

„Ha, tio sonas bone! Cetere mi informiĝos en la ĉiloka bankodomo, ĉu li estis tie.“  
Nun Gustel venis al ni.

„Sinjoro najbaro, mi estis vokita pro Vi. La verspermanĝo estos je la naŭa horo, kaj mi montru al Vi Viajn ĉambrojn jam nun.“

„Ĉu ĉambrojn? Mi pensis, ke estus nur apartaĵoj!“

„Tie malantaŭe estas alkonstruaĵo, kiu havas kelkajn ĉambrojn. Inter ili estas du, kiun Doña Elvira nur uzas, kiam venas vizitantaj parencoj.“

„Tie certe ankaŭ loĝis *señorita* Alma, ĉu?“

„Jes, mi aŭdis pri tio, kvankam mi ne jam estis estinta tie ĉi tiutempe.“

„Ĉu Vi ankaŭ aŭdis, ĉu tiu sinjorino konis unu Allan Marshal:on, kiu tiutempe loĝis tie ĉi?“

„Ho, jes! Oni ofte parolis kaj ridis pri tio: Ŝi amĉasis tiun sinjoron tiel ege, ke li preskaŭ ne povis forteniĝi de ŝi. Sed venu! Mi jam havas la ŝlosilojn.“

Ni stariĝis kaj sekvis ŝin. La du ĉambroj, kiujn ni ricevis estis nomindaj valoraj, rilate al la alia ekipaĵoj de la ‚hotelo‘. Unu ricevis Bernard kaj Sans-ear, kaj la alian Winnetou kaj mi. Ĉasar estis loĝigata en aparta ĉambro.

La helpema najbarula filino havigis nin ĉion, kio necesis al ni, pro doni al nian eksteron pli agrablan aspekton, kaj tial ni baldaŭ estis pretaj eliri. Winnetou restis tie. Li estis tro fiere, ke li ne volis esti objekto de spektemo al la homoj sur la stratoj kaj placoj de la urbo. Ankaŭ Mark kuŝiĝis sur la liton.

„Kion mi faru en la urbo?“ li diris. „Mi povas iradi, tion mi ekzemple ne pruvu tie ĉi, kaj mi jam vidis sufiĉe da domoj kaj homoj. Faru, ke ni baldaŭ povos eliri el tiu ne-trankvila nesto sur la savanon, alikaze miaj oreloj rekreskos per nura enuado, kaj tio estus la fino de ‚Sans-ear‘!“

La bona Mark troviĝis nur malmultajn horojn tie ĉi, sed jam sentis sopiron pri la libera prerio. Kiel nu fartu la ‚sovaĝuloj‘, kiam ili, pro esti ‚plibonigataj‘, estas donataj en malvastan, solecan ĉambreton en malliberejo en Philadelphia aŭ Auburn, ĉar ili defendiĝas kontraŭ la forpelo de la terenoj, kiuj estas ilia hejmlando, kiuj donas nutraĵon al ili kaj entenas la tombojn de iliaj patroj kaj fratoj!

Nia irado en la urbon ne estis senkaŭze. Bernard kaj mi iris al la bankisto, kun kiuj la Marshal:oj negocadis. Sed ni nur eksciis, ke Allan estis tie nur kelkajn fojojn, kaj tiam post mallonga adiaŭo iris al la minejoj. Li kontantigis ĉiujn valoraĵojn kaj kunprenis ĉion, pro aĉeti *nugget*-ojn per ĝi.

Post tiu nesukcesa vizito ni promenadis sur la stratoj, ĝis Bernard subite tiris min en *store*:on, kie aĉetebliis ĉiaspecaj vestaĵoj en ĉiuj eblaj kvalitoj kaj grandecoj. Ĉi tie oni povis elekti la plej fajnajn meksikajn pompvestojn, sed ankaŭ la tolajn laborkitelojn de kulio.

La intenco de Bernard estis facile pensebla. Niaj vestaĵoj, kvankam ili estis el dika ŝtofo, estis aĉiĝintaj dum la longa vojaĝo tiel, ke ni vere ne nur iomete, sed eĉ tute aspektis sufiĉe malnoble. Ni ja estis razitaj, ni ankaŭ estis frizintaj la harojn unu de la alia, sed la vestaĵoj vere aspektis malbonege. Dum la aĉetado mi rimarkis, ke Bernard havis bonan guston. Por si li elektis *trapper*-veston, kiu ĝustis al li sufiĉe plaĉige, nur la prezo estis rilata al la cirkonstancoj de San Francisco.

„Nu, venu, Charley; ankaŭ unu por Vi!“ li diris, kiam li estis finiĝinta. „Mi helpas al Vi serĉi.“

Hm, mi ja vere nepre bezonis tiajn aĵojn, sed al tiuj prezaltecoj mia kaso ne estis pretiĝinta. Mi neniam apartenis al la bedaŭrindaj homoj, kiuj ĉie, kien ili etendas la manojn, ricevas centdolaran bileton inter la fingrojn, kaj ĉie, kien ili iras, faletas trans monersakon, kontraŭe mi apartenas al tiuj admirinduloj, kiuj havas la dolĉan konscion hodiaŭ gajni, kion ili morgaŭ bezonos. Kaj tial mi certe ankaŭ faris iomete embarasitan mienon, kiam Marshal tuj post siaj vortoj ekkomencis la ‚serĉadon‘.

Li elektis veston, kiu konsistis el tiuj partoj: ĉasĉemizo el neĝblanke tanita cervida ledo, fajne brodita ruĝe de indianinaj manoj; leggins el cerva dorsledo, franĝita je la flankoj; ĉasjakon el bubalhaŭto, sed tamen fleksebla kiel felo de sciuro; botoj el ursledo, kies tubojn mi povis tiri alten ĝis la lumboj, la kalkanumojn el la plej bona ŝtofo, kiu povis ekzisti pro tiu rimedo, fakte el la haŭto de vosto de finkreskinta aligatoro; kaj fine kastoran ĉapon, kies rando kaj kovrilo estis ornamita per haŭto de sonserpento. Bernard ne permesis kontraŭon, mi devis surmeti la vestaĵojn en eta apartaĵo, kaj kiam mi elpaŝis, li jam estis paginta ilin, pri kio mi vane protestis.

„Ĉesu tion, Charley!“ li diris. Mi ankoraŭ ŝuldas multon al Vi, kaj kiam Vi ne volas akcepti tion, mi skribos tiujn aĵojn sur Vian fakturon, kion ni bilancisgos ajn iam poste.“

Li ankaŭ volis kunpreni kelkajn aĵojn por Mark, sed mi konvinkis lin ne fari tion, ĉar mi konis la lojalecon de la malgrandulo pri sia pratempa vesto, kaj krome, ĉar Sans-ear havis figuron, al kiu ĝustis neniu pretfarita vestaĵo.

La plej grandan ĝojon pri mia ŝanĝo sed havis Cäsar, kiam ni reeniris al la ‚hotelo Valladolid‘.

„Ho, *massa*, nun aspektas tre multe bone bele, tale bele kvale Cäsar, se anke ricevus nova vesto e boneto!“

Mi ne povis eviti ĝin, pro tiu bonanima komparo mi devis rekompenci lin per danka vido, ĉar mi sciis, ke la negro faris sian plej bonan kapablon per tio.

La ĉambro estis ŝajniĝinta tro malvaste al Mark Jorrocks. Li sidis sole en la gastejo ĉe tablo kaj mansignis al ni, kiam li vidis nin enveni, ke ni sidiĝu ĉe li.

„Aŭskultu!“ li diris duonlaŭte. „Tie flanke de ni estas interparolado, kiu koncernas ekzemple ankaŭ ni.“

„Pri kio?“

„Tie supre en la minoj kaj *diggin*:oj okaziĝis aĵoj, pri kiuj oni ne povas pensi bone. Tieas multaj *bravo*:j, sed ne *indio*:j, sed ŝajne blankuloj, kiuj atakas la hejmen irantajn *digger*:ojn kaj neigas ilian vivojn, kaj kelkajn plu. Tie sidas iu, kiu povis saviĝi antaŭ ili

per ega peno. Li ĵus rakontas sian aventuron. Aŭskultu!“

Ĉe la tablo malantaŭ ni mi rimarkis plurajn virojn, je kiuj oni povis vidi klare, ke ili koniĝis al la danĝeroj kaj mizeroj de la vivo, kaj unu el ili ĵus faris raporton, kiun ĉiuj ĉirkaŭsidantoj aŭskultis per la plej granda atento.

„*Well*“, li ĵus diris, „mi estas Ohio-ulo, kaj tio signifas, ke mi spertis multon sur la riverego kaj la savano, sur akvo kaj sur tero, sur la montoj kaj en la valoj de la okcidento. Mi estis ekkoninta la riverkaperistojn de la Mississippi kaj la embuskistoj de la *woodland*:oj, kaj vere faris kelkajn interbatalaĵojn kun ili. Mi supozas kelkajn petolaĵojn esti eble, pri kiuj pluraj aliaj treege dubas, sed ke tia aĵo povas okaziĝi sur tiel trafikriĉa strato, eĉ je la mezo de la hela tago, tio estas afero, kiu estas pli nebla aĵo ol la *gun*, per kiu oni povas pafi ĉirkaŭ angulo.“

„Sed tamen ĝi sonas, kvazaŭ ĝi ne estas ekzakte laŭ la vero“, diris alia. „Vi ja estis tuta karavano, kun dek kvin viroj kontraŭ ok rabistoj. Ĉu ne estus malhonorige, se ĉio okaziĝis tiel, kiel Vi rakontis?“

„Vi parolas tre ruze kaj saĝe, *mann*, sed nur spertu ĝin mem!“ estis la respondo. „Ni fakte estis dek kvin viroj, ses *tropeiro*:j kaj naŭ *miner*:oj. Se Vi volus fidi pri tiuj *tropeiro*:j, Vi pereus, kaj el la *miner*:oj tri havis febron. Ili apenaŭ povis teniĝi sur la muloj, kaj tiel suferis per la malsano, ke ili povis fari nek certan pafon nek bonan tranĉilpuŝon. Nu, ĉu ni vere estis dek kvin viroj, ha?“

„Kiam Vi prezentas la aferon tiel, ĝi vere estiĝas pli bone kompreneble. Sed la strato ja estas veturata, rajdata kaj ankaŭ irata, ke ĉiutempe estas homoj en la proksimo, de kiu oni povas ekspekti helpon!“

„Certe, sed kiu malhelpu al la fiuloj atendi ĵus tiun momenton, en kiu tio ne estas la kazo?“

„Do rakontu la aferon nur ĝuste laŭ la vico, proke oni povas kompreni ĝin!“

„Tute laŭ Via volo, *mann*. Nu, ni estis trovinta supre ĉe la piramid-lago *placer*:on, kian ne povis ekzisti pli bona kaj abunda, kaj Vi nur kredu tion, ke post ok semajnoj ĉiu el ni kvar havis sian propran centfunton da orpulvoro kaj *nugget*:oj. Ni ne povis labori plu, ĉar la loko estis finlavita, kaj la malvarmego rigidigis la artikojn de du el ni. Ne estas facila aĵo staradi de frue ĝis malfrue en la akvo ĝis al la koksoj, pro skuadi la *batea*:n. Ni do enpakis ĉion kaj reeniris ĝis al la Yellow Water Ground, kie ni vendis nian akiron al *yankee*, kiu pagis multe pli ol la fibubaj ŝanĝistoj, de kiu oni ricevas pro unco da pura oro unu funton da malbona faruno aŭ duonan funton da eĉ pli malbona tabako. Sed la viro tamen faris bonajn profitojn. Mi kredas, li nomiĝis Marshal, kaj hejmis en Kentucky aŭ tie ĉirkaŭe.“

Rapide Bernhard turniĝis.

„Ĉu li ankoraŭ estas tie?“

Mi ne scias, ankaŭ ne estas mia afero. Sed lasu min trankvile sen senutilaj demandoj; ĉar se mi vere devas rakonti la aĵojn laŭ la vico, kiel postulis tiu ĉi viro, mi ne estu ĝenata! Do tiu Marshal, Allan Marshal li certe nomiĝis, aĉetis ĉion, kion ni havis. Se ni nun estus estinta saĝe, ni estus ekirinta. Sed unue ni volis ripozi post la suferitaj penoj — ĉar niaj ostoj nepre bezonis flegadon — kaj due ankaŭ ne tieis ĝustanta kunvojaĝebl-

eco. Oni kaŝparolis kelkajn fojojn pri rabatakoj, kaj eĉ menciis la nomojn de diversaj viroj, kiuj estis forlasintaj la *diggin*:oj kaj neniam alvenis al Sacramento aŭ San Francisco.“

„Ĉu tio veris?“

„Vi aŭdos ĝin, kiam mi plirakontos. — Ni atendis kelkajn semajnojn. Sed la vivo tie supre estas diablece multekosta, kaj ĉar oni sciis, ke ni ne havis malplenajn poŝojn, nia tuta amuzo estis daŭra defendiĝado kontraŭ kartotrompisto kaj similaj suspektuloj, kiuj ĉiuhore ĉirkaŭis nin. Ankaŭ la artikoj de la du kamaradoj pliboniĝis, kaj tial ni decidis ne atendi plu, sed kuniĝi kun kvin viroj, kiuj, same kiel ni, ne plu volis resti. Ni nun estis naŭ personoj kaj dungis la bezonatajn mulojn, per kio nia nombro estis plimultigita je ses *tropeiro*:j. Ni ĉiuj estis bone armitaj, ankaŭ la *tropeiro*:j, el kiuj cetere ĉiu aspektis, kvazaŭ li povus defendiĝi kontraŭ dek atakantaj malamikoj. La vojaĝo estis komencanta, kaj unue ni ankaŭ povis antaŭeniĝi tre bone. Sed tiam komencis pluvadi tiel daŭre, ke la febzo reaperis en niaj malsanuloj. Krome la akvo tiel malmoligis la vojon, ke ni povis antaŭeniĝi nur tre malfacile. Je plena tago ni pasigis apenaŭ ok mejlojn, kaj eĉ ne estis sekure dumnokte en niaj tendoj antaŭ la fluo, kiu falegis de la ĉielo, kvazaŭ iu estus renversigita tie supre eminente grandan barelegon. Per tio la febzo ĉiam pli fortiĝis, tiel ke ni devis fiksligi la malsanulojn sur la mulojn dum la rajdado.“

„Malbeninda malbona afero“, diris iu el la ĉirkaŭsidantoj. „Mi ankaŭ jam travivis unu tiun rajdaĉojn kaj scias ekzakte, kiel oni fartas dum tio.“

„*Well!* Ni nun estis pasintaj ĉirkaŭ du trionojn de la vojo, kaj serĉis restejon je la vespero. Ni ĵus okupiĝis starigi la tendojn, kaj bruligis fajron, kiu estis sufiĉe grande pro lumigi la ĉirkaŭon taghele: tiam subite ekkrakis pafaro ĉirkaŭe. Mi ĵus surgenuis en la ombro de mia tendo sur la tero, kaj estis okupata ligi ŝnuron al la floko, tial oni ne povis vidi min. Rapide mi stariĝis, kaj ĵus je la ĝusta tempo pro vidi, kiel niaj *tropeiro*:j surĉevaliĝis kaj forrajdis. Sed tio okazigis per tia trankvileco, ke la *bravo*:j estus povinta pafmortigi ilin dek fojojn. Mi ĵus estis levonta la pafilon, sed kio okazis tie, retenis min fari tion. La kugloj de la ok rabistoj estis tiel ekzakte trafintaj iliajn celojn, ke la kvin sanuloj, kiuj estis laborintaj ĉe la brilo de la fajro, kuŝis morte sur la tero. Ĵus en tiu momento, kiam mi etendis mian manon al la pafilo, la tri sanuloj estis neigantaj. Nur mi restis tute sole. Kion Vi estus farinta en tian situacion, ha?“

„*Hell and damnation!* Mi tuj estus atakinta la fiulojn kaj aginta laŭ mia povo!“ iu diris.

„Ne, mi estus foriginta kelkajn el ili per miaj kugloj!“ asertis alia.

„Tre bone!“ la rakontisto deklaris. „Tion Vi diris, sed aginta vi ĉiuj estis nur tiel, kiel ankaŭ agis mi. Ataki ilin estus estinta pura frenezo. Pafi al ili same ne estis konsilinda, ĉar tiam mi ankaŭ estus pereinta. Ja ne devis atestantoj de la atako vivi plu. Tial la murdistoj estus sekvintaj min, ajn kiel longe mi povis kuri, kaj mortiginta mi estus ĉiel nur unu aŭ du.“

„Nu, kion Vi faris?“

„Mian monon mi havis bonpapere en la poŝo; mia mulo estis proksime ĉe la tendoj, fiksaligita ĉe la aliaj bestoj. Mi do kaŝiris, kiam la fiuloj ekzamenis la tendojn, al ĝi kaj

malligis ĝin. Subite unu el ili ekfaris fajfon; mi aŭdis huffrapadon, kaj — kion Vi pensas, okazis?“

„Ĉu?“

„La *tropeiro*:oj revenis. Ili estis perfidintaj nin al la fiuloj kaj nun ricevu ilian parton de la akiro. Nun la krimistoj estis dek kvar virojn forte. Mi sidiĝis sur mian beston kaj forgalopis, ajn kiel rapide ĝi povis kuri. Je mia feliĉo ne estis pacanima kreaĵo, kaj ne obstinema bestaĉo, kian oni ofte trovas inter ilia speco. Mi ja aŭdis laŭtajn malbenojn kaj egan bruon malantaŭ mi, tiam mi ankaŭ aŭdis huffrapojn, sed estis malhele kaj mi feliĉe povis fuĝi.“

„Kaj poste, ĉu?“

„Kio poste! Mi urĝiĝis veni al San Francisco, kaj mi ĝojas, ke mi povas sidi tie ĉi kun sana haŭto kaj drinki mian ĝlason da *porter*“.

„Ĉu Vi ne rekonis unu el la *bravo*:jn?“

„Ili surhavis nigrajn maskojn. Nur unu, kiu ŝajnis esti la estro, kiam li metis la fingrojn al la buŝo pro fajfi, kaj ŝovis la ĉifonaĵon malsupren, kaj mi povis vidi lian vizaĝon. Mi certe tuj rekonis tiun homon, se li iam ekaperus antaŭ mi. Estis mulato. Sur lia dekstra vango estis larĝa cikatro, kiu verŝajne estis kaŭzita de profunda lezo per tranĉilo.“

„Kaj la *tropeiro*:j, ĉu?“

„Mi rekonis ilin ĉiujn, sed mi ja neniam plu venos en tiun inferon, kie la diablo lavas kaj fandas sian oron, pro logi la animojn en morton kaj pereon.“

„Kiu estas la nomo de la mulero? Ofte estas bone koni la nomon de tian fidignulon!“

„Li nomiĝas Sanchez, sed certe estis havinta unu aŭ kelkajn aliajn nomojn. M'taksas, ke la plej multaj el tiuj fiuloj apartenas al la *bound*:oj, kiujn San Francisco elkraĉis en ĉiujn minejojn, kaj kiuj nun laboras kiel perantoj, *tropero*:j, *mulero*:j kaj rabistoj, helpante unu la alian. Estus plej bone, se la *miner*:oj kuniĝus al *vigilance-committee*, kiel tiutempe en San Francisco, kiu povus transpreni la taskon persekuti kaj neigi tiujn figurojn, ĝis komencas regi pli bonaj statoj en la *diggin*:oj. Nu, nun mi rakontis ĉion laŭ la vico, kaj estas je la fino.“

„Tiukaze permesu al mi, demandi denove pri tiu Allan Marshal, pri kiu Vi estis parolinta“, Bernard anonciĝis. „Li estas mia frato.“

„Via frato, ĉu? Verece, ŝajnas al mi, ke Vi similas al tiu! Do diru, kion Vi volas scii pri li!“

„Ĉion, kion Vi scias mem pri li. Kiom da tempo pasiĝis, ekde Vi vidis lin la lastan fojon?“

„Nu, ĉirkaŭ kvin semajnoj.“

„Ĉu Vi pensas, ke li ankoraŭ troviĝas en la Yellow Water Ground?“

„Mi ne scias. Tie supre en la minejoj oni estas tie hodiaŭ, kaj aliloke morgaŭ, kvankam oni ĉiam planas ne foriri.“

„Allan neniam skribis al mi, kvankam li ricevis plurajn leterojn de mi.“

„Tion Vi ne supozu tiel certe. Nur memoru, kion mi estis rakontinta! Ĉu estas poŝta trafiko de tie ĉi al la minejoj? Jes, sed kion Vi nomas tiel, ne vere estas poŝta trafiko.“

Mi diras al Vi, estas multaj leteroj sendataj supren aŭ malsupren, sed tamen neniam iĝas en la mano, kiu malfermu ĝin. Tie supre Vi iras en drinkejon, kaj la estro apartenas al la *bound*:oj. Vi iras en *store*:on, kaj la vendisto estas *bound*. Vi ludas *monte*:n kun tri viroj, kaj unu, eble du aŭ eĉ ĉiuj tri estas *bound*:oj. Vi kunlaboras societe kun iu pri Via *claim*, kaj li estas *bound*, kiu aŭ deprenas de Vi, kiun Vi akiras, aŭ, se Vi estas tro forta kaj atentema al li, perfidas Vin al la *bravo*:j, pro minimume ricevi parton de Via posedaĵo. En la eja administracio estas *bound*:oj, ĉie estas *bound*:oj. Do kial ne ankaŭ en la poŝto, al kiuj gravas ne lasi diversajn aĵojn atingi la ĝustan viron?“

Tio nun vere ne estas alloga imagigo de la cirkonstancoj en la minejoj. Bernard silentis.

„Ĉu Vi volas iri supren al la frato?“ la Ohio-ulo demandis.

„Tutcerte.“

„*Well*, do mi donos bonan konsilon al Vi. Ĉu Vi agos laŭ ĝi, estos Via afero. Ĉu Vi scias, ke estas la Yellow Water Ground?“

„Mi nur scias, ke estas flanko valo de la Sacramento, nenion pli.“

„La vojo tien estas tri kvaronojn ĉirkaŭ la golfeto de San Francisco kaj tiam trans la Rio San Joaquin transe al la Sacramento-valo. Tie Vi nur devas rajdi ĉiam supren kaj povas ekscii de ĉiu pasanto aŭ ĉe ĉiu *claim*, kie troveblas Via celo. Se Vi ne kunhavas multajn pakaĵojn, Vi povas atingi ĝin post kvin tagoj. Sed mi ne konsilas uzi tiun vojon.“

„Kial?“

„Unue ĝi ja estas la pli komforta, sed ne la plej mallonga. Due ĝi nun estas malcertigata per la *bound*:oj. Ili ja certe atakas la venantojn de la minoj, ol la tien irantojn, sed oni ja ne scias, ĉu ili foje faras la malon. Kaj trie tiu vojo estas pavimita, fakte per dolaroj kiujn oni laŭvorte tiras el la poŝoj de la vojaĝantoj. En la gastejoj oni tie progresiĝis kulture tiel, ke oni skribas fakturojn. Sed tiujn aĵojn estas pli facile legeblaj ol pageblaj. Vi tie donas unu dolaron pro ĉambro — kaj ricevas du manplenojn da maljuna pajlo; unu dolaron pro lumo — kaj Via lanterno estas la lumo; pro servo unu dolaron — kaj Vi neniam vidos serviston; unu dolaron pro la lavkuvo — kaj Vi laviĝu en la Sacramento; unu dolaron pro la mantuko — kaj Vi sekiĝos per Via propra ĉasvesto. La sola fakturero, kiun oni pagas kaj fakte ricevas, estas: unu dolaron pro la fakturo! Kiel Vi ŝatas tion, *Mr. Marshal*?“

„Aĉe!“

„Tion mi ankaŭ pensas. Tial mi diros al Vi alian kaj pli bonan vojon, laŭ kiu Vi, se Vi havas bonajn rajdobestojn, atingos la Yellow Water Ground post kvar tagoj: Per la pramŝipo Vi transu la golfeton, kaj de tie direktiĝu al la montoj de St. Johns, tiam turniĝu okcidenten, kaj kiam Vi atingos la Sacramento:n, Vi same estas je la celo, almenaŭ en ĝia proksimo. Akvofluo, kiuj gvidos Vin al la direkto, sufiĉe tieas.“

„Dankon, *Sir*! Mi agos laŭ Via konsilo.“

„*Well*! Kaj se Vi tiam ĉe la Sacramento aŭ sur la altaĵoj trovas mulaton, kiu havas tranĉaĵon en la dekstra vango, gustumu al li Vian tranĉilon aŭ Vian kuglon, ĉar mi diras al Vi, ke Vi faras bonan agon per tio!“

Intertempe la tempo de la vespermanĝo alvenis, kaj Gustel venis pro sciigi nin. Ŝi kondukis nin en flankan ĉambron, kie la tablo estis pretigita, kvazaŭ societo de

hispanaj *grande*:oj estu manĝantaj. Doña Elvira jam atendis nin. La gastejestro ne vid-  
eblis. La *señora* akceptis siajn gastojn, kiun mi prezentis al ŝi per la deca soleneco, kun  
la mieno de regantino, kiu donas indulgan aŭdiencon, kaj per malsuprenteneco, kian  
hinda noblulo ne povus esti farinta ĝin pli bone.

Ĉar gravis al ŝi, laŭeble fari impreson, la interparolado komence priis la fakojn de  
arto kaj scienco, sed pli poste, kiam ni estis honorigita per la deca honorigo, la *señora*  
plie komencis scivoli pri ni kaj niaj cirkonstancoj, kaj ni devis raportigi pri niaj spertaĵoj.

Kiam ŝi deklaris la manĝadon finiĝite, ŝi diris: „*Señor*:oj, mi esperas esti pruvintaj al  
Vi, ke mi preferas Vin plie ol ĉiuj miaj gastoj, kaj pensas, ke plaĉos ĉe mi sufiĉe longe!“

„Doña Elvira de Gonzalez, ni dankas pro Via bonanimeco“, mi respondis. „Ni ja  
tutcerte pasigos pli longan tempon en Via gastema domo, sed ne nun, ĉar ni devas jam  
morgaŭ frue fari etan pluvojon intertempe.“

„Kien, *señor*?“

„Al la Sacramento, pro trovi Allan:on. Ni tiam kunvenigos lin tien ĉi!“

„Prave, *señor*:oj. Kunprenu ĉion de mi, kion Vi bezonas. Mi fakturos ĝin pli poste!  
Kaj se Vi ankoraŭ havas deziron, nur turniĝu al Augusta! Sed entute mi esperas, ke Vi  
ankoraŭ diros Vian *ádios*:on al mi, antaŭ Vi foriros morgaŭ.“

Ŝi ŝvebumis elen, kaj ni sekvis ŝin pro viziti niajn ĉevalojn, kaj poste kuŝiĝi pro  
ripozo. Je la sekvinta mateno ni transiĝis per pramŝipo trans la golfeto kaj deŝipiĝis sur  
la duoninsulon vidalvide al San Francisco.